JUNIO 2000

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

# La Espero

2000:3



# Helsingborgaj impresoj

## LA ESPERO


***Organ för Svenska Esperantoförbundet***

ISSN 0014–0694
Junio 2000 • 88-a jarkolekto
Fondita en 1913

**Redaktion:**
Jan Setréus
Janko Luin (layout)

**Frågor om prenumeration o. dyl.:**
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, tel. 08–34 08 00

**E-post:** *espero@esperanto.se*

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi, Tyresö

**Tryck:** HA Reklamtryck, Stockholm

**Prenumeration 2000:** 180 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12–3, Esperantoförbundet:


## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, **tel. 08–34 08 00,** fax 08–34 08 10

**E-post:** *sef@esperanto.se*
**Nätsida:** *www.esperanto.se*

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2000:**
Direktansluten medlem 180 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 90 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 270 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 90 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 – 34 08 00

**Fax:** 08 – 34 08 10

**Postgiro:** 578–5

**Nätsida:** *www.esperanto.se/eldona*

**Telefontid:** Samma som Esperanto-Centro Stockholm. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Styrelsens ordförande:** Bertil Nilsson

***Manusstopp den 15/8***

**Manus till La Espero**
**sänds till Jan Setréus**
**Mörtgatan 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden**

***telefon/fax:*** **08 – 717 75 67**
***e-post:*** **jan.setreus@spray.se**

*La Espero* estas presata sur recikligita papero.

## NI PREZENTAS

# Lovisa



Saluton!

Mia nomo estas Lovisa Gustafsson, kaj mi ekde 19/3 2000 prezidas SEJUn por unu jaro. Mi venas el malgranda vilaĝo ekster Mariestad. Momente mi studas en Upsalo, kie mi klopodas helpi vigligi la junularan Esperanto-movadon. Esperanton mi lernis ĉe Karlskoga Popola Altlernejo dum la aŭtuno -98.

Popolaltlernejan studadon mi povas forte rekomendi, ankaŭ se ne temas pri Esperanto. La etoso tie ŝajnas al mi similan al tiu de Esperantujo. Do, mi estas sufiĉe nova esperantisto. Tamen antaŭ la semestro en Karlskoga mi partoprenis someran kurson en Lesjöfors, kaj ankaŭ en KEF.

Dum la printempo de -99 mi partoprenis interŝanĝon kune kun Julija el Ukrainio. Pro tio mi havas pli da praktiko de la lingvo ol la plej multo dum tiel mallonga tempo.

Prezidante SEJUn mi alstrebos helpi al ĉiuj novaj (kaj malnovaj) membroj senti sin bonvenegaj kaj instigi ilin partopreni la agadon. SEJU estas nur tio, kion ĝiaj membroj faras!

## ESPERANTOFÖRBUNDETS STYRELSE

**Ordförande:** Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-7128291, franko@esperanto.se
**Vice ordförande:** Bengt Nordlöf, Boforsgatan 23, 123 46 Farsta, tel. 08-934170, bengt@esperanto.se
**Sekreterare:** Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Haninge, tel. 08-7774175, roland@esperanto.se
**Kassör:** Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-412205, (freds@artech.se)
**Ledamöter:** Håkan Lundberg, Fisksätra torg 12 4tr, 133 41 Saltsjöbaden, tel. 08-7177869, Hokan.Lundberg@telia.com
- Wim Posthuma, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås, tel. 021-133529, wimp@quicknet.se
- Kjell Randehed, Ragnvallagatan 30C, 256 63 Helsingborg, tel. 042-155969, ttt@telia.com
- Keiko Snarberg, Johan Skyttes väg 15, 554 40 Jönköping, tel. 036-113799, kickan_snarberg@hotmail.com

**Suppleanter:** Jan Setréus, Mörtgatan 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden, tel. 08-7177567, jan.setreus@spray.se
- Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Haninge, tel. 08-7774175, roland@esperanto.se


## STYRELSEN FÖR SVENSKA ILEI

**Ordförande:** Bertil Andreasson, Södra Rörum 455, 242 94 Hörby, 0415-50152, bertil.andreasson@horby.mail.telia.com
**Vice ordförande:** Lars Forsman, Folkhögskolan, 691 24 Karlskoga, 0586-54811, lars.forsman@fhsk.karlskoga.se
**Kassör:** Lisbet Andreasson, Södra Rörum 455, 242 94 Hörby, 0415-50152, bertil.andreasson@horby.mail.telia.com
**Ledamöter:** Bertil Nilsson,Biskop Brasks gränd 25, 176 76 Järfälla, 08-58354463, m63sn3g7@students.su.se
- Inga Johansson, Stampgatan 60 B-127, 411 01 Göteborg, 031-155723, ishim@hotmail.com

# Alla tillsammans

***Ur verksamhetsberättelsen för år 1999 framgår att SEF tappar medlemmar. Att organisationen minskar kan enligt min mening inte tolkas som att intresset för esperanto minskar. Hela Organisationssverige upplever samma tendenser: att medlemsantalet sjunker, att organisationsformen inte upplevs som nödvändig.***

Våra esperanto-organisationer är 100 år och uppbyggda på ungefär samma sätt som för 100 år sedan. Det gör också de flesta andra organisationerna i Sverige – freds-, nykterhets-, politiska, fackliga osv. Men vi umgås inte på samma sätt längre och lever helt annorlunda: har bättre utbildning, reser, har världen inpå oss hela tiden. Det gör inte idén med esperanto mindre aktuell, tvärtom. Som någon på årskongressen i Helsingborg sa: esperanto är en idé i tiden. Jag ser ingen anledning att sluta verka för esperanto. Men vi måste göra det på andra sätt.



På seminariet i Jönköping och under årskongressen i Helsingborg kom det tydligt fram att man eftersträvar en annorlunda organisation för att föra fram esperanto. Hur denna organisation ska se ut vet vi inte än, men behovet finns. Den ska omfatta dom delar av den nuvarande organisationen som fungerar och integreras med nya verksamheter och grupper.

### Vi har alla samma mål: esperanto

Jag tror inte att vi behöver en ny samlingsorganisation. Vi är inte tillräckligt många för det och vi har alla ett och samma mål: esperanto. Orsakerna till att det bildades olika organisationer en gång i tiden finns inte kvar, därför borde vi se till att samla alla esperantister i en organisation. Inom denna organisation kan vi sedan ha avdelningar, grupper eller sektioner, t.o.m. företag, om någon eller några hittar möjligheter att leva på esperanto. Dessa kan vara med lokal förankring eller efter särintressen. Varje sådan sektion kan åta sig specifika uppgifter som kan vara riktade till medlemmar eller till utomstående. Dessa avdelningar, grupper eller sektioner kan fungera som arbetsgrupper med kortvariga uppgifter (t. ex. att anordna ett seminarium, kurs, utställning) eller mera långtgående (t.ex. att ge ut en medlemstidning, att sköta medlemsbokföringen, att driva en lokalförening eller Esperanto-Gården, att ge ut böcker och musik, förse tidningarna med information om esperanto, att skapa och sprida musik – listan kan göras oändligt lång).

Vi behöver fler grupper med särintressen, grupper "på tvären", som samlar medlemmar intresserade av samma frågor. Dessa kan vara religion, yrke, fritidsintressen, gemensamma kunskaper... Oftast hittar man inte tillräckligt många av samma slag på samma ort, men det kan finnas här och där i landet. Det gäller att hitta former hur dessa kan förena sitt intresse för esperanto med sina övriga intressen och göra det tillsammans med likasinnade. Flera har talat om "nätverk". Kan man bygga en organisation på nätverk? Skulle det fungera? Hur samordnar man nätverkets olika verksamheter så att de samverkar och förstärker varandra?

### En organisation behövs

Vi behöver en organisation. Utan en sådan skulle det mesta arbetet för esperanto stanna av och språket skulle bli en ren privat angelägenhet. Vi behöver också ekonomiska medel, sådana som flyter in i form av medlemsavgifter, bidrag och gåvor, som betalning för utförda tjänster. Och vi behöver en central instans som samordnar nätverkets olika verksamheter. Vi behöver, med andra ord, än bättre central samordning och ett finmaskigare nät. Centralisering och decentralisering på samma gång. Låter det konstigt?

Vi har börjat få nya medlemmar som kommer till esperantorörelsen via internet, ibland utan att någonsin ha träffat en esperantist. Vi måste behålla dom också och hitta meningsfulla uppgifter för dom. De är vana att umgås på ett annat sätt – är vi det? Vi måste också se till att det känns meningsfullt att vara med i esperanto-gemenskapen, att man får "valuta för pengarna" när man betalar medlemsavgiften, att man hittar så mycket "plusvärde" i organisationen att man väljer att ägna en del av sin tid åt den.

### Alla tillsammans

Esperantorörelsen, hur vi än organiserar den eller hur vildvuxen den kan utveckla sig, är och förblir en ideel rörelse och är beroende av medlemmarnas arbetsinsatser. Att förlita sig på att saker ska ske av sig själva, eller på att andra ska göra det, för inte idén med esperanto vidare.

Som jag skrivit i *La Espero* för många år sen: esperantorörelsen, det är du, och du, och du och jag. Bara om vi hjälps åt och gör något tillsammans ger vi idén om ett internationellt språk chansen att utvecklas och spridas vidare.

**Franko Luin**


# Midsommarfirande

på Esperanto-Gården i Lesjöfors

Midsommarafton 12.00 lunch
14.00 traditionell majstångsresning och danslekar
Kvällsunderhållning med familjen Bertse

Vidare information:
Lennart Svensson tel. 0590-309 09 fax 0590-303 09
egarden@esperanto.se

# Impresoj el Helsingborg



Dankon kaj ĝis revido, Roland - ĉu baldaŭ?

Fotoj: Ulla Luin

Post dek kvin jaroj okazis denove kongreso en Helsingborg. En 1985 la malnova klubo preparis kaj aranĝis, sed ĉi-foje la tute nova klubo, *Aktiva Esperantoklubo*, surprenis respondecon aranĝi kongreson por SEF.

En 1985 ni estis tre bonŝancaj, ĉar ni povis prezenti du eminentulojn en la inaŭguro. La plej konata estis nia membro, la prezidanto de la sveda parlamento Ingemund Bengtsson. La alia estis prezidanto de la urba estraro Stig Blixt.

La sola eksterulo en nia ĉi-jara inaŭguro estis persono, kiu vere sentas sin hejme en nia kongresejo Olympiaskolan, la rektoro Leif Andersson. Li ne venis pro eminenteco, sed pro intereso pri esperanto, kaj li esprimis ĝojon, ke esperanto troviĝas inter la elekteblaj lingvoj. Olympiaskolan havas pli da instruataj lingvoj ol gimnazioj ĝenerale.


Parolante pri esperanto en Olympiaskolan, ni devas memori la tiaman gimanzianon Henrik Randehed, ĉar li ludis gravan rolon en la realigado de enkonduko de esperanto. Poste lia patro Kjell Randehed neplanite devis surpreni la taskon instrui esperanton, ĉar oni ne trovis iun alian, kiam estis tempo komenci.

Ni bezonas eminentulojn, kiuj apogas nin, kaj ni bezonas homojn, kiuj komprenas la aferon kaj faras la necesan laboron. Do, dankon al rektoro Leif Andersson kaj al la aliaj, kiuj partoprenis en la realigado.

## Kie estis la gejunuloj?

Sciante, ke 50 gimnazianoj studis esperanton en Olympiaskolan, oni povus atendi partoprenon de multaj el ili en la kongreso, sed ili ne venis. Montriĝis, ke gimnazianoj trovas esperanton interesa kiel studobjekto, sed tio ne signifas, ke ili tuj volas fariĝi "pacaj batalantoj". Se ili studas, ekzemple, la hispanan lingvon, neniu postulas, ke ili membriĝu en la klubo por la disvastigo de tiu lingvo.

Alia kaŭzo estas, ke SEJU ne trovis sufiĉan entuziasmon por envolvi sin en la planado de programeroj por gejunuloj. Ŝajnas, ke SEJU konscie perdis la plej bonan ŝancon de la jaro 2000 kolekti la gimnazianojn por komuna amuzo kaj plezuro.



*Ĉagrenita nova prezidanto: "Ĉu mi neniam lernos diri Ne, dankon?"*

## Kie vi loĝas?

La kongrespartoprenantoj ĉi-foje devis mem prizorgi mendon de hotelo por si. Tio ne estas kutimo en niaj kongresoj. Plej ofte ni okazigas kongresojn en konferencaj hoteloj kaj tiam estas facile por ĉiuj.

Venontjare ni ne havos problemon serĉi ĉambrojn, ĉar ni denove kongresos en Esperanto-Gården en Lesjöfors.

La disa loĝado en diversaj hoteloj, kie dimanĉa matenmanĝo estas servata malfrue, kaŭzis problemojn por la KELI-anoj, kiuj preparis matenan diservon.

Alia nekutima aranĝo rilatas al lunĉoj kaj tagmanĝoj. Pro manko de funkcianta restoracio en la lernejo, oni mendis servadon de entrepreno, kiu alportis la manĝon al ni. Per tia aranĝo la manĝoprezo estis malalta, sed certe fariĝis surprizo por ĉiuj membroj, kiuj ofte partoprenas en niaj kongresoj, ke ili devis manĝi rekte el aluminiaj skatoloj. Nova sperto, sed prefere ne ripetota.

## Kongresa jarkunsido

Roland Lindblom malfermis la jarkunsidon, ĉifoje tutcerte la lastan fojon, ĉar post la kunsido li ne plu estis prezidanto de SEF. 16 jaroj kiel prezidanto estas absolute sufiĉe.

Ulla Luin prezidis en la kunsido kaj Gertrud Lund skribis protokolon. Kiam punkto elekto de prezidanto aperis sur la tagordo, subite kaj surprize aperis du kandidatoj por la posteno, Kjell Randehed kaj Franko Luin.

Franko estas spertulo en la estraro de multaj jaroj, kaj ĉiuj konas lin. Kjell ĵus aperis sur la scenejo kaj lia sperto en la estraro konsistas el unu jaro kiel anstataŭanto. La kunsido elektis la personon, kiun ili plej bone konas, kaj tio signifas, ke la nomo de la nova prezidanto estas Franko Luin.

Tute nova inter la elektitaj estraranoj estas Keiko Snarberg el Jönköping. Ŝi tamen estas konata en nia SEJU-estraro, en kiu ŝi membris dum pluraj jaroj. La du aliaj elektitaj estraranoj por du jaroj estas Kjell Randehed kaj Håkan Lundberg, ankaŭ li de SEJU.

## UEA ĉeestis

Kalle Kniivilä, membro de la UEA-estraro, venis el sia hejmurbo Lund por informi nin pri kelkaj aferoj, kiuj koncernas la internacian laboron por esperanto.

Antaŭ nelonge okazis estrarkunsido, kaj tiam Osmo Buller rakontis pri sia vizito al Göteborg por esplori pri la taŭgeco de Göteborg kiel kongresa urbo en 2003. Laŭ Kalle la ŝanco por




Foto: Willem Posthuma

kongreso en Göteborg estas tre granda.

La plej ĝojiga informo, kiun Kalle donis, estas ke iu japano donacis monsumon al UEA, egala al 7 milionoj da svedaj kronoj.

Multaj el la aŭskultantoj ne antaŭe aŭdis prelegon de Kniivilä. Ili post kelkaj minutoj povis konstati, ke li perfekte regas nian lingvon, kaj ke li prononce kaj mesaĝe parolas tre klare. Kalle estas ĵurnalisto kaj li certe estas tre valora en la estraro de UEA.

### Aŭkcio

Franko Luin denove fariĝis aŭkciisto kaj sukcesis vendi ĉiujn librojn. Dum tiu sama programpunkto tri personoj venis por rakonti pri interesaj libroj. La tri personoj estis Lars Forsman, Harold Brown kaj Bertil Nilsson.

### Programero pri gimnazioj

Sub gvido de Kjell Randehed dum ĉi-tiu programero Henrik Randehed povis rakonti pri sia rolo en enkonduko de esperanto en la gimnazion Olympiaskolan. Jessica Hanmeier rakontis pri alia provo enkonduki esperanton en privatan gimnazion en Helsingborg. Ekzistis granda intereso, sed aliaj obstakloj malebligis enkondukon en tiu jaro.

Lars Forsman rakontis pri siaj prelegoj en gimnaziaj klasoj diversloke. Li antaŭ nelonge vizitis kvar gimnaziojn, naŭ klasojn, en Göteborg, kaj la aŭskultintoj eĉ aplaŭdis post la prelego. Do: kiu instruos esperanton en Göteborg?

### Muziko el Litovio

El Litovio venis la kvaropo *Asorti* por amuzi nin per muziko kaj kantado. Tiuj, kiuj antaŭ kelkaj jaroj aŭdis la grupon en la UK en Tampereo, povis rekoni la gepatrojn, sed ne la du junajn kantistinojn. En Tampereo ilia filo ludis violonon kaj per tio vekis admiron, sed ĉi-foje li ne povis veni.



*Jelena kaj Edvardas Pisĉikas, la Asorti-paro, kiu per muziko kaj kantoj amuzigis nin en Helsingborg, helpataj de du belsonaj knabinoj, Julija kaj Jeva.*

### Ekskurso al Danlando

Kelkaj partoprenis en la postkongresa ekskurso al la konata ekspoziciejo Louisiana en Danlando, aliaj komencis sian vojaĝon hejmen en bela vetero.

Antaŭ ni estas la somero kun multaj esperanto-aranĝo: Baltaj Esperantotagoj, kursoj en Lesjöfors, Universala Kongreso en Tel Aviv, TEJO-kongreso en Hong Kong, ILEI-konferenco en Francio, Kvinpetalo, ktp...

**Roland Lindblom**
*eksprezidanto*

# REZOLUCIO

por konstanta konferenco de Eŭropa Unio pri la Eŭropa lingvo-problemo

I

La partoprenantoj en la Sveda Esperanto-Kongreso, kunvenintaj en Helsingborg (Svedio) la 20-an kaj 21-an de majo 2000,

- *konsiderante* ke multobliĝas denuncoj fare de lingvistoj kaj de eminentaj kleruloj pri la riskoj de progresiva marĝeniĝo de niaj lingvoj favore al la angla lingvo;
- *konsiderante* ke lingvo estas ne nur komunikilo, sed nepre necesa esprimilo de iu kulturo, kiu sen ĝi ne povas pluvivi;
- *prikalkulante* do ke la dirita risko koncernas la eŭropan identecon mem, kies esenco kuŝas ĝuste en la plureco de la kulturoj de la malnova kontinento;

II

- *rimarkante* krome ke la lingva reĝimo nuntempe reganta en E.U. – de laŭnoma egalrajteco de ĉiuj lingvoj – fariĝas des pli malfacila kaj multekosta ju pli kreskadas la nombro de la lingvoj de la Unio, kaj tial tiu egal-rajteco iĝas pli kaj pli nur ŝajna;
- *prikalkulante* fine ke, se la unuiĝo de Eŭropo antaŭeniros kaj pli kaj pli alprenos politikan dimension kaj supernacian strukturon, ĝi devos solvi en malpli neadekvata kaj neefika maniero, ol hodiaŭ okazas, la problemon de la intereŭropana komunikado;

III

*konsiderinte* ĉion ĉi, sugestas ke, pro iniciato de la aŭtoritatoj de E.U., kaj aparte de la Eŭropa Parlamento – la Unia institucio, kiu plej multe suferas la menciitajn lingvajn malfacilaĵojn – oni starigu konstantan konferencon pri la lingvoj, kiu prefere kunsidu ĉiujare en la sama urbo kaj je la sama dato, en kiu reprezentantoj de E.U. kaj de ĝiaj institucioj, naciaj politikistoj, lingvistoj, aparte kvalifikitaj kleruloj kaj fakuloj kaj reprezentantoj de la eŭropistaj organizaĵoj diskutu la lingvajn problemojn de Eŭropo kaj aparte tiun de la intereŭropana komunikado kaj proponu adekvatajn kaj ne iluziajn solvojn.

*Helsingborg, la 21-an de majo 2000*



*Ankaŭ kaftrinkado povas esti uzata por agrabla interbabilo*

# Ett steg mot framtiden

## TVÅ MILJONER

Franko Luin meddelar att räknaren på SEF:s nätsida har slagit över till 2 som första siffra. Det betyder att vi fått mer än 2 miljoner besök sedan februari 1996.

Stella Lindblom påminner sig med anledning härav en händelse i fjol när hon gick in på SEF-sidan: "Först kunde jag inte låta bli att känna mig lätt förföljd. Undrade hur i hela friden informationen jag såg på sidan kunde ha hamnat där ... Mitt personnummer! 630409. Jag var besökare nr 630409, vilket inte gick upp för mig på flera sekunder.

PS. Stellas personnummer är fingerat.

---

Jag vill inte påstå att esperantorörelsen är ett konkursbo, lika litet som jag är anhängare av marknadsekonomi. Inte heller är jag en förespråkare för planekonomi, modell öststatsdiktatur. Men hade det funnits en tredje ekonomi, utan räntor, plundring och utsugning av människor, djur och utan rovdrift på miljön så skulle jag gärna skrivit under på en sådan. Det kanske kommer.

Men man kan inte låta bli att göra vissa personliga reflektioner. Den svenska esperantorörelsens första drygt hundra år, visar med facit i hand att det varit ett uppsving och en nedgång i stora drag. 1998 bröts trenden och esperanto kom in på gymnasieskolorna för att stanna. Därför är detta ett viktigt årtal att komma ihåg, i den mån nu årtal skulle vara viktiga att lägga på minnet. Många gånger är det bättre att minnas vad som hände än när det var. Plötsligt började pressen skriva intressanta och informativa artiklar och en helsida var inget ovanligt. Idag är esperanto på väg att vinna nya anhängare och utövare, Bertil Nilsson kallar dem esperantokonsumenter och varför inte.

### Ungdomarna och ekonomin

Återigen med facit i hand kan man konstatera att man missat det viktigaste i en folkrörelse nämligen ungdomen och ekonomin. Klubbarna runt om i landet har missat skolorna, trots att medlemmarna rimligtvis själva är föräldrar. För många sitter skräcken kvar från sin egen ungdomstid. Skräcken och respekten för "överheten" och många återvände aldrig till sina gamla skolor när de en gång lämnat den.

Idag sitter klubbarna runtom i landet utan ungdomar och välplacerat kapital. I bästa fall har man gnetat ihop några tiotusentals kronor på ett värdelöst sparkonto, trots att det finns ekonomer med i rörelsen. Det var sannerligen inte mera ädelt att placera pengarna på ett bankkonto än att söka alternativa vägar och lösningar. Om man t.ex. fonderat pengarna och sett om sitt hus i tid så hade esperantorörelsen varit rik idag. Vi hade kunnat äga fastigheter, tryckerier och andra företag som kunnat skapa sysselsättning för medlemmarna och gett avkastning till nya projekt.

Det är mycket svårt att förstå tankarna bakom och vi ska kanske inte fördjupa oss närmare i detta. Istället bör vi dra lärdom av historien och redan nu försöka dra upp riktlinjerna för nästa hundra år och komma ihåg att även den längsta resa börjar med första steget.

Därför vill jag på eget bevåg uppmana alla klubbar som har pengar att fondera dem klokt. Investera dem för framtiden och satsa på ungdomen. Den avkastningen som kapitalet ger kan man sedan använda till att höja nivån på esperanto. Det kan man knappast med ett sparkonto som inte ger någon avkastning. Glöm heller inte esperantorörelsen i era testamenten!

Det är vi som ska skapa förutsättningarna för morgondagens esperantorörelse, att växa sig stark och utvecklas.

### Aktiefonder

I första hand är det inte aktier som gäller, eftersom dessa ska skötas och kontrolleras regelbundet och man ska köpa och sälja i rätt tid, vilket kräver kunskap och intresse. Långt ifrån alla klubbkassörer har detta, därför rekommenderar jag alla som frågar att satsa på aktiefonder. Då minimerar man riskerna med en stor riskspridning och det är fondförvaltarnas experter som placerar kapitalet. Det ligger lika stort intresse för dessa att avkastningen blir optimal, då alla fonduppgifter är offentliga och resultaten nagelfars dagligen i media fram och tillbaka, tidningarna är fulla med ekonominyheter och man jämför de tio bästa fonderna etc.

Man bör också tänka på att sedan 1945 har kursen inte gått ner under någon femårsperiod.

Det finns olika sätt att fondera på. Man kan satsa pengarna i s.k. etiska fonder som strävar efter att inte investera i tobak, alkohol eller vapentillverkning. Vidare finns det fonder där 12 procent kan tillfalla den egna föreningen. Jag ska inte namnge någon fond här eller ens rekommendera. Detta bör varje klubb själva ta ställning till, men privat kan jag givetvis ha en åsikt som alla andra.

Det blåser nya vindar nu, filosofer, trubadurer och poeter i all ära, det är mycket trevligt. Men det behövs även ekonomer och tekniker i vår rörelse som kan vara minst lika humanistiska. Först när det visat sig att det finns ekonomiska och tekniska fördelar med esperanto kan nivån och därmed statusen höjas.

Pengar har alltid varit en drivkraft för människor, utan pengar är det svårt att vara idéell, annat än i tankarna, därför kära läsare och esperantokonsumenter. Våga ta steget mot framtiden. Välkommen i klubben.

**Kjell Randehed**


Gör din egen hemsida. Eller klubbens.

**21, 22 och 23 juli**
**Esperanto-Gården, Lesjöfors**

Snabbkurs från fredag kväll till söndag em.
Inga förkunskaper behövs. Ledare: Franko Luin.
Kostnad inkl. 2 logi och mat 2 dagar: 820 kr.

Vidare information:
Esperanto-Gården, tel. 0590-309 09 fax 0590-303 09
egarden@esperanto.se

# Nyhetsflöde

TT har skickat åtminstone två korta notiser om Helsingborgkongressen Jag har själv sett en av dem i Dagens Nyheter. Den är bara på några rader och handlar om att SEF fått ny ordförande och att Lindblom ska ägna sig åt ordboksarbete.

Den andra notisen har jag inte sett i tryck, men den nämner att SEF beslutat inbjuda till världskongress i Göteborg 2003. Den notisen skickade Kaisa Hansen till TT på söndagen. Notisen föranledde en telefonintervju i Radio Stockholm c:a 9.45. Intervjun gick ut direkt och var på ca 3-4 minuter. Jag fick de vanliga frågorna: vad är esperanto, hur många talar det, varför esperanto när det finns engelska, var är esperanto mest spritt, hur många språk talar jag själv och varför behövde jag dessutom esperanto. Jag fick översätta två korta meningar och inbjuda till Göteborg 2003. Inbjudan fick jag göra på esperanto.

Radio Stockholm har ofta busschaufförerna i stockholmsområdet på, eftersom den innehåller trafikinformation och i övrigt mest musik. Även hos frisörerna och i olika väntrum brukar den stationen vara den som oftast sprids via högtalare.

**Franko Luin**

## PIRONEJO

Håkan Lundberg en Stockholm estas komputilprogramisto kaj esperantisto, eksprezidanto de SEJU. Antaŭ nelonge li kombinis siajn profesion kaj ŝatokupon aranĝante internacian seminarion pri Interreto kaj komputiloj.

Sian lingvan scion Håkan perfektigis per libroj de Claude Piron (pseŭd. Johán Valano).

En Interreto (*http://w1.871.telia.com/~u87101714/Pironejo.htm*) li nun kolektis informon pri Piron nomante la interretan paĝon Pironejo. Li intervjuis Piron, kaj eĉ la organo de UEA, Esperanto, publikigis parton de la intervjuo (majo 2000).

**Red.**

# Vizito de UEA

La 5-an de aprilo vizitis nin Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA. Li vizitis Gotenburgon kaŭze de la eventuala UK en Gotenburgo en 2003, por vidi ĝiajn eblecojn je kongresejoj, loĝiĝo kaj sociaj progra-moj. La viziton financis Göteborg & Co., organizo de la komunumo kaj la loka entreprenaro, kiu merkatadas Gotenburgon kiel vojaĝocelon, kaj i.a. kiel lokon por grandaj kongresoj.

Osmo Buller veturis en limuzino de la flughaveno al la restoracio Fiske-krogen kie oni lunĉis. La aliaj parto-prenantoj dum la tago estis Roland Lindblom (prez. de SEF), Christer Lörnemark, Andreas Nordström, Siv Burell kaj kvar reprezentantoj de Göteborg & Co. La partoprenantaj esperantistoj povis vidi Svenska Mässan (foirejo kaj kongresejo), Lise-berg (apuda amuzparko), student-ĉambrojn kaj la hotelon Panorama (la lastajn kiel ekzemplojn pri loĝigo; en Gotenburgo troviĝas kongresaj loĝ-ejoj en ĉiuj prezkategorioj. Oni ankaŭ ĉirkaŭveturis en la urbo, ricevis ĝeneralajn informojn pri Gotenburgo kiel vojaĝocelo k.a.

Vespere estis kunveno en la klubejo kun ĉ. 15 esperantistoj , inter ili Osmo Buller kaj Roland Lindblom. Osmo Buller rakontis pri la nederlanda esperantomovado kaj pri la centra oficejo de UEA en Roterdamo. UEA havas 12 dungitojn, se oni enkalkulas la estraranojn, kaj ili venas de 8 landoj. Nur unu el ili estas plentempe dungita. Ankaŭ troviĝas 1-4 volontuloj. La plej mallonga restadtempo de volontulo estas unu semajno, sed la plej multaj restas 2-3 monatojn, en certaj kazoj unu jaron.

La formalan inviton al UK en Gotenburgo faras Sveda Esperanto-Federacio en junio. Inter la paperoj akompanantaj la inviton troviĝos invito de Esperanto-Societo de Gotenburgo, informoj pri kongresejoj, k.a. La Lokan Kongresan Komitaton (LKK) elektos UEA, laŭ propono de SEF; SEF siavice akceptas proponojn de nia klubo. En nia klubo la t.n. UK-grupo jam pretigis nomproponon pri la plej gravaj postenoj en LKK. En la grupo ni nun kunmetas informojn por la formala invito. La estraro de UEA alprenos sian decidon en julio aŭ septembro.

**Christer Lörnemark**

# Esperanto i Södertälje

Det har uppstått en liten grupp esperantointresserade i Södertälje. Under vintern har vi träffats varje vecka. Verksamheten har hittills mest bestått av esperantostudier, men det lär bli även andra program framgent. Om du vill vara med, ta kontakt med Gunvor Spector
tel. 08 – 550 118 47

**Nils-Erik Kristoferson**

# Jarkunsido de la Suda Distrikto

La Suda Distrikto de SEF okazigis sian jarkunvenon en Malmö la 12-an de marto 2000.

La ĉefa diskuttemo dum la jarkunsido estis la estonteco de la distrikto. La estraro prezentis la nunan situacion kaj konstatis ke la distrikto estas la sola vivanta en Svedio inter tiuj, kiuj foje kovris la tutan landon. La laborformoj estas malmodernaj kaj la tempo preterpasis la iamajn ideojn. Ni devas iamaniere ŝanĝi la labor-metodojn kaj eble eĉ ĉesigi la distrikton. Tamen la nova ponto super la Sundo ebligas novajn kontaktojn kun niaj danaj samide-anoj kaj eble ni povas transformi la distrikton en iun novan. La jarkunsido decidis komisii al la estraro kontakti ĉiujn membro-klubojn kaj kun ili diskuti la problemon. La estraro ankaŭ ricevis la komision aranĝi ekstran membro-kunsidon en oktobro kaj tiam prezenti planon por la estonteco.

Dum la jarkunsido oni ankaŭ diskutis la plej bonan solvon investi niajn monajn rimedojn. La jarkunsido decidis nuligi la jaran membro-kotizon.

La nuna estraro konsistas el:
Bertil Andreasson, Hörby
Sten Svenonius, Malmö
Lisbet Andreasson, Hörby
Gertrud Lund, Malmö
Kjell Randehed, Helsingborg
Ann-Louise Åkerlund, Helsingborg

**Bertil Andreasson**
*(El La Folio aprilo 2000)*

# Tri novaj esperanto-kantoj ĉe mp3.com

La juna sveda kantisto Magnus registris pasintjare tri proprajn kantojn, en kiuj li kantas en esperanto. Aperis malgrandkvante k-disko kun ili, kiu tuj finvendiĝis. Nun liaj tri kantoj estas elŝuteblaj ĉe la populara retejo mp3.com (http://www.mp3.com/magnus) tute senpage.

*(El NUN)*

# Svenska språket diskriminerat i EU

Sydsvenskan skrev den 15 februari 2000:
Svenska språket diskrimineras i EU. Det hävdade regeringen i en skarp protestskrivelse till EU-kommissionen för ett år sedan. Orsaken till ilskan var att bara 25 procent av ministerrådets många möten hade tillgång till svensktalande tolk. Men den svenska protesten ledde inte till någon förbättring. Tvärtom. Idag tolkas bara 20 procent av EUs rådsmöten till eller från svenska. Det visar siffror från EU-kommissionens tolktjänst SCIC, som Sydsvenskan har tagit del av.

Hela artikeln finns på http://sydsvenskan.se.

**Kalle Kniivilä**
*(Ur Esperantonytt)*

## DONACOJ

### MEMORE DE INGVAR ERIKSSON

Gulli Svensson, Malmö 50 kr

### KLUBO CENT

Tore kaj Signild Johansson, Kalmar 200 kr

SEF kore dankas por la donacoj. Novaj donacoj estas bonvenaj al poŝtĝiro de SEF 2012-3. Ankaŭ regulaj donacoj en Rondo Langlet oni povas aranĝi sammaniere.

SEF tute dependas de donacoj. Membrokotizoj tute ne sufiĉas por la agado.



# Märtha Andréasson



Märtha Andréasson, Gotenburgo, forpasis la 8-an de majo, 73-jara, post longa kormalsano. Tio, kio speciale karakterizis la agadon de Märtha, estis ŝia multflankeco. Ŝi laboris sur ĉiuj niveloj – loka, regiona kaj internacia. Nura mencio de ŝiaj postenoj forte impresas: prezidanto de Esperanto-klubo de Kungälv kaj Esperanto-Alianco de Gotenburgo (kunlabora organizo por Esperanto-kluboj en la urbo kun ĉirkaŭaĵoj), estrarano de Sveda Esperanto-Instituto, ano de ILEI, SAT, SLEA, Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato kaj delegito de UEA. Antaŭe ŝi estis prezidanto de Esperanto-Gården en Lesjöfors, estrarano de Sveda Esperanto-Federacio, konsilanto de Monda Kunagado, ano de komitato de UEA, Virina Agado kaj LKK-ano de la SAT-kongreso en Gotenburgo 1976, k.a. Inter ŝiaj multaj aranĝoj oni povas mencii la standon en la unua foiro "Kvinnor kan" (Virinoj kapablas) 1984 kaj la ILEI-konferencon en Kungälv 1985, kiun ŝi kunorganizis. Ŝi ankaŭ aranĝis en 1986, kaj en kelkaj sekvaj jaroj, lingvajn seminariojn en "Nordiska folkhögskolan", kaj dum la lastaj jaroj multe laboris pri la seminarioj de Sveda Esperanto-Instituto. Multan laboron ŝi ankaŭ dediĉis al Esperanto-Gården.

Ŝia energio ŝajnis neelĉerpebla. Neniu tasko estis tro granda aŭ tro humila por ŝi. En la organizoj, kiujn ŝi gvidis, ŝi havis kompletan superrigardon pri la agado kaj konstante pretis helpi al la membroj en kiu ajn demando. Ne ofte oni trovas en nia movado tian kombinon de praktika organizkapablo kaj profundaj lingvaj scioj.

Neniam ŝi perfidis siajn idealojn: pacon, humanismon, pli justan socion. En la Esperantomovado ŝi trovis esprimiĝon de ĉio tio.

Märtha eklernis Esperanton en 1953. Kiam alproksimiĝis la centjara jubileo de la gotenburga Esperantomovado, ŝi estis memkomprenebla kunaŭtoro de la libro "Esperantorörelsen i Göteborg 1892-1992". En tiu konekso ŝi faris gravajn esplorojn. En 1997 ŝi iniciatis la agadon inter la goten-burgaj esperantistoj por Universala Kongreso.

Por la gotenburga movado la vundo ŝajnas nesanigebla, la lakuno neŝtopebla. Kio plej dolorigas nin, ŝiajn kunlaborantojn, estas la bedaŭrinda fakto, ke ŝi ne havos eblecon travivi la Universalan Kongreson en ŝia propra urbo, se UEA decidos okazigi ĝin ĉi tie.

**Ebbe Vilborg**
*kaj aliaj gotenburgaj esperantistoj*

# Ingemund Bengtsson

(1919-2000) Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, mortis la 12-an de aprilo.

Li estis membro de la sveda parlamento dum multaj jaroj kaj servis kiel ministro de agrikulturo kaj labormerkato. Li finis sian parlamentan karieron kiel ties prezidanto (1979-88).

En 1972 li gvidis la signifopolenan internacian konferencon pri medio en Stokholmo, el kiu sekvis la starigo de Media Programo de UN. Ĝuste Bengtsson fariĝis la unua prezidanto de ĝia gvidkonsilio.

Ingemund Bengtsson ofte surprizis la svedan ĵurnalistaron per montroj de sia lingva lerteco, kaj tial oni ofte menciis liajn lingvajn kapablojn.

En 1979 la sveda LKK por la UK 1980 en Stokholmo bezonis Altan Protektanton. Ni sciis ke Bengtsson studis Esperanton en studrondo kiam li estis 18-jara. Montriĝis ke li pli ol volonte akceptas tian honoron: li eĉ denove ekstudis Esperanton. Du tagojn antaŭ la UK li partoprenis en gazetara konferenco, al kiu venis pli ol 40 ĵurnalistoj. Antaŭ la inaŭguro li ĉe-estis la akcepton por diplomatoj, kaj komence de la inaŭguro li bonvenigis la kongresanojn al Svedio per Esperantlingva prelego.

Unu jaron poste li aranĝis studviziton en la parlamentejo por la esperantistoj de la Stokholma regiono. En 1984 li invitis la estraron de Sveda E-Federacio al Bonniers Villa, kiun la registaro uzas por eminentaj gastoj. Jen tuta vespero kun supeo kaj interesaj diskutoj en vere familia etoso kun "nia" Ingemund.

En gazetoj kaj televidaj programoj, ĉe prezento de Ingemund Bengtsson, oni preskaŭ ĉiam starigis demandojn pri lia intereso pri Esperanto. Ĵurnalo iam demandis, dum liaj someraj ferioj, kion li estas faranta. Li respondis: "Mi legas libron en Esperanto: Winnie-la-Pu."

En sia pozicio li ofte partoprenis en bankedoj kun la reĝo kaj la reĝino, kaj iun fojon li sidis sufiĉe longe kun la reĝino por bone instrui al ŝi la gramatikon de Esperanto. Li estis entuziasma por Esperanto kaj diris al ni en la sveda estraro ke ni ĉiam rajtas utiligi lian nomon en reklamo por la lingvo. Jubilea jaro 1987, jubilea sveda kongreso. Kie? En la sveda parlamentejo! Bengtsson havis decidrajton pri ĝia ludono al aliaj aranĝoj ol pure parlamentaj, kaj li mem proponis ĝin al SEF kiel okazejon. Bedaŭrinde, Bengtsson malsaniĝis semajnon antaŭ tiu kongreso, sed rezerve troviĝis alia parlamentano por inaŭgura prelego en Esperanto, Daniel Tarschys – nun iom pli konata pro sia kvinjara deĵoro kiel Ĝenerala Sekretario de Konsilio de Eŭropo.

Ĉu ni iam ricevos similan mecenaton por Esperanto en Svedio denove?

**Roland Lindblom**
*(El Esperanto majo 2000)*

# Inga Magnusson

La 19an de aprilo forpasis Inga Magnusson en la aĝo de 83 jaroj. Ŝi dum 30 jaroj estis prezidantino de nia klubo.

Inga M. interesiĝis pri La Internacia Lingvo kiam ŝi 10-jara eksciis pri Esperanto aŭskultante fabelojn rakontataj je kunvenoj de ABF. Sed nur 20 jarojn poste ŝi komencis serioze studi la lingvon. Tiam ŝi ankaŭ komencis vojaĝi al kongresoj kaj aliaj aranĝoj en Svedio kaj Eŭropo. Ŝi preskaŭ ĉiun jaron, kiam la sanstato tion permesis, vojaĝis kune kun sia amikino Ulla Nordh. Ilia unua UK en Bologna 1955 profunde impresis ilin. Dum la UK en Stokholmo 1980 ili deĵoris en la akceptejo kaj bonvenigis gastojn el multaj landoj.

La Klubon Esperantan de Helsingborg Inga gvidis dum la jaroj 1966 ĝis 1996. Ŝi fervore laboris por vivteni la klubon kaj ŝi apenaŭ maltrafis iujn kunvenojn, eĉ post sia eksiĝo kiel prezidantino. Por la 75a sveda jarkongreso en Helsingborg 1985 ŝi multe laboradis por ke la proksimume 100 gastoj kiel eble plej multe profitu el la aranĝo. La laboro rezultigis tre sukcesan kongreson.

Krom la laboro por la klubo ŝi kune kun aliaj klubanoj laboris por aranĝi kunvenojn ankaŭ en la internacia popollernejo de Helsingør kaj por ricevi danajn gastojn ĉi tie en Svedio. Ŝi estis dumviva membro de UEA depost 1972.

Ni esperantistaj geamikoj funebros Inga-n kun granda bedaŭro. Ni kondolencas ŝiajn filinon kaj du nepinojn kun familioj.

**Helsingborgs Esperantoklubb**
**Ann-Louise Åkerlund**



princo Karlo, belga reganto dum la milito kaj kun la fortikaĵo Atlantikwall. Sabate vespere estis bankedo kun tri pladoj kaj vino. Dimanĉe, post ekumena diservo, ŝipekskurso al Nieuweport, ĉe la marbordo.

Venonta Eŭropunia Esperanto-Kongreso okazos en Verona post tri jaroj.

*(El EKSpreso 3/2000)*

kaj amikoj omaĝis je la pioniroj de la revuo kaj gratulis pri ĝia konstanta modernigo. Aparte impresis la vortoj de ĝia eks-direktoro Zhang Qizheng, de Pro Chen Yuan kaj de la reprezentanto de la islanda ambasadoro prononcataj kun forta konvinko. Ĉiuj deziris longan vivon al nia plej bela E-a revuo.

*(El NUN)*

## KORESPONDADO

Irana E-klubestro, 30-jarulo, serĉas gekorespondemulojn por siaj geklubanoj de 17-ĝis 37-jara pri ĉiuj temoj. Li ankaŭ serĉas s-aninon por geedziĝo.

**M. Mehdi Noruzi**
Box 838
Neshat st.
Esfahan 81465
Iran
e-poŝte: *mhdnoruzi @yahoo.com*

Hungaro, kiu estas 37-jara kaj komencanto de Esperanto volus konatiĝi kaj amikiĝi kun fremdaj familioj, homoj en aliaj landoj. Li deziras korespondi pri ĉiu temo kaj interŝanĝi bildkartojn.

**Litauszki Gyula**
2213 Monorierdö
Bokor u. 28
Hungario

# Nova landa asocio

La movado Esperanta en Afriko pli kaj pli progresas. Unu el la atingoj de la lastaj tagoj estas la ekfunkcio de AEK (Esperanto-Asocio en Kamerunio). Senĉesaj klopodoj de Dualaj Esperantistoj revivigas la landan asocion.

**Gbeglo Koffi**

# Kongreso en Oostende

Ĉirkaŭ 300 personoj el diversaj eŭropaj landoj partoprenis la eŭropunian kongreson en Oostende 27/4-1/5. Inter ili estis sep svedoj, kvin el Stockholm kaj du el Hörby. Vendrede vespere estis solena malfermo. Sabate okazis ekskurso prame, aŭte aŭ bicikle, al kompostejo de la urbo Oostende kaj al Raversijde kun muzeo de

# E-kurso en Vaska Universitato

Dum la venonta lerneja kurso (2000 - 2001) unuafoje okazos Esperanto-kurso en la Universitato de la Vaska Lando, Bilbao, kun akademia valoro je 4 kreditoj kaj duono. Do, Esperanto jam estas instruata oficiale ĉe 4 hispanaj universitatoj: Valencia, La Laguna, Barcelona kaj Bilbao.

*(El NUN*

# La 50-jara jubileo de El Popola Ĉinio

El Popola Ĉinio solene festis sian oran jubileon la 18-an de majo en Pekino, en salono abunde dekoraciita kie ekspozicio de fotoj memorigis pri pioniroj kaj pri vizitoj de eksterlandaj legantoj. Mesaĝoj de UEA, de TEJO, kaj multaj paroladoj de kunlaborantoj

# E-kurso en televido

La hispana televidkanalo 54 prezentas Esperanto-kurson gvidatan de s-ano Marti Guerrero i Cots. Ĝi okazos ĉiun duan semajnon kaj la partoj estas plurfoje ripetataj intertempe. La programo kapteblas en tuta Hispanio. La kurso komenciĝis la 2-an de marto je la 16-a horo. Leteroj de esperantistoj, ankaŭ hispanoj, estas bonvenoj por plifavorigi la kurson. La leteroj sendeblas al:

**Canal 54**
Passeig Ferrocarrils Catalans 117-119
ES-08490 Cornella de Llobregat (Barcelona)
Hispanio

# La libroservo de UEA en interreto

Kompleta katalogo de libroj, diskoj, kasedoj, videofilmoj, insignoj k.a. varoj vendataj de la Libroservo de UEA estas nun konsultebla en TTT ĉe http://www.uea.org/katalogo . Kun 4.100 titoloj la sortimento estas senkompare la plej granda en Esperantujo.

En la reta katalogo oni povas serĉi librojn laŭ kategorio, titolo, aŭtoro, tradukinto kaj traduklingvo. Oni povas tre facile elekti la dezirataĵn varojn, kompili mendon kaj sendi ĝin al la Libroservo de UEA, kiu tuj plenumos ĝin.

La katalogo estas regule aktualigata, dum la libroforma katalogo, aperonta en oktobro, ne-eviteble iom post iom malaktualiĝos.

La enretigo de la katalogo estis teknike realigebla danke al la kompetenta volontula laboro de Michiel Meeuwissen el Nederlando.

*(El Eventoj, interredaktore))*

# Kultura Esperanto-Domo

La senprofitcela asocio Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj fondita en 1951, posedas kastelon **Grésillon** kun 18-hektara parko. Ĝi organizas kursojn, prelegojn, distraĵojn, ekskursojn. Ĝi disponigas kurso-ĉambrojn, bibliotekon, libroservon, salonojn, butikon.

Somera programo i.a.:
**15/7 – 21/7:** Esperanto-kursoj, kantado en Esperanto, piedmigrado
**24/7 – 29/7:** Esperanto-kursoj, prezento de magistriga tezo pri Esperanto, teatro-praktikado, piedmigrado
**31/7 – 5/8:** Esperanto-kursoj, prelegoj
**7/8 – 12/8:** Esperanto-kursoj, peckudrado, prelegoj
**14/8 – 19/8:** Esperanto-kursoj, jogo, prelego

Kosto de ĉiu staĝo 180 FF
Aliĝo al la Asocio 50 FF
Infanoj sub 16 jaroj – entute 50 FF
Manĝoj kaj loĝado estas aldonaj, laŭ aranĝo.

Informo kaj aliĝo:
Paulette Naulet
Au Bourg
FR – 49490 BREIL
Francio
tel./fakso 00-33-2-41 82 55 22
UEA-konto gres-y

## INFORMATIONSMATERIAL

# Ett virtuellt trycksakslager




Under seminariet i Jönköping har många gamla idéer ventilerats och flera nya fötts. Många av dem behöver diskuteras vidare och bli mera konkreta, andra har redan börjat förverkligas.

Två sådana idéer kommer att göra informationsarbetet lättare för klubbar och enskilda esperantister. Den som snabbast gick att förverkliga fick namnet **Trycksakslagret**. Det är ett papperslöst trycksakslager som man hittar på internet och som f.n. omfattar tio enheter. Det är flygblad och foldrar som kan hämtas på SEF:s sajt och köras ut i den egna skrivaren i ett eller flera exemplar. Trycksakerna har medvetet hållits enkla och kompakta (en A4 eller en vikt A4), så att vem som helst ska kunna klara dem utan annan utrustning än en skrivare.

Alla trycksakerna är layoutade och finns i s.k. pdf-format. Ifall de innehåller uppgifter som behöver uppdateras kommer alltid den senaste versionen att finnas på internet. Man behöver inte heller bekymra sig för esperantobokstäverna: dom finns alltid med.

Följande trycksaker kan hämtas redan nu:

- *Esperanto: idé och verklighet*, A5, 4 sidor
- *Esperanto har aldrig tidigare känts så angeläget*, A5, 4 sidor
- *Esperantorörelsens Pragmanifest*, A4, 1 sida
- *Ett smakprov*, A4, 2 sidor
- *Ett språk som engagerar till internationella kontakter*, liten annons, 87x35 mm
- *Man har sagt mig...*, A5, 4 sidor
- *Nu är det din tur*, A6, 4 kort per A4, 2 färger
- *Nyfiken på esperanto?*, A4, 2 sidor
- *Vad är ett världsspråk?*, A5, 4 sidor
- *Vi är alla födda lika. Är vi det?*, A4, 1 sida

Adress: *http://www.esperanto.se/html/trycksaker.html.*

Har du inte tillgång till internet är du inte ställd. Du kan beställa utskrifter från Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm. Du får ett original som du kan kopiera i det antal du behöver. Några av trycksakerna finns på Esperanto-Centro i flera exemplar.

**Trycksakslagret** kommer att växa och innehålla texter för många olika ändamål. Tips om vilka andra trycksaker som skulle kunna läggas till välkomnas.

**Franko Luin**




## DEBATT

# Volapük eller esperanto som brospråk

Roland Larsson har i La Espero 2000:2 kommenterat min artikel i Arbetaren 2000:8.

Den ursprungliga tanken då jag tog kontakt med Arbetaren var att jag skulle skriva om J.M. Schleyer och hans halvt geniala, halvt bisarra skapelse, "världsspråket" volapük. Under skrivandets gång fick jag ingivelsen att sätta in volapük i ett större sammanhang – alltså världs-språksrörelser överhuvudtaget. Då jag nu läser om det jag skrev, tycker jag fortfarande att jag uttalade mig väldigt positivt om esperanto. Roland är besviken över att jag inte skrev mer, men utrymmet var begränsat. Redaktören för Arbetaren hade till och med skurit något lite i mitt manus inför tryckningen.

Jag nämnde engelskans utbredning endast som ett konstaterande. I tv ser man dagligen intervjuer med folk av alla nationaliteter. Franska tennis-spelerskan Anne Gaëlle Sidot intervjuas. Språk: engelska. Spanska dito Arantxa Sanchez intervjuas. Språk: engelska. Tyskan Anke Huber – engelska igen – &c &c. Ingenting vi kan göra något åt, lika lite som vi kan påverka solens upp- och nedgång eller tidvattnets in- och utgång.

Jag sympatiserar naturligtvis helt med Roland då han fördömer "svengelskan", denna erbarmliga rotvälska, denna de halv- och obildades eget knoparmoj. Det blir inte bättre av att ett flertal inlån har misstolkats eller felöversatts.

Vad gäller ett "brospråk" för EU, är det helt riktigt att enorma belopp skulle kunna sparas. Jag ville nu inte dra in politik i min artikel – den skulle ju i första hand handla om volapük – men jag kan kanske tillåta mig detta här och nu.

Den sällsamma och för många ofattbara sanningen är denna: För besparingar inom EU-administrationen finns inget intresse internt eftersom pengar vräker in, dygnet runt. Bara från en liten randstat som Sverige kommer 80 euro i sekunden. I mitten av 90-talet blev det ett ramaskri om vidriga djurtransporter. EU grep in med lagstiftningar och förordningar, gigantiska papperstravar på nio språk. Nu, fem år senare, är de enda förändringar som skett snarast till det sämre. Vi kan därför tänka oss att vi finge ett EU-beslut om ett brospråk, volapük, esperanto eller interlingua. Man behöver inte ha doktorerat i matematik för att beräkna antalet kommisionärer och andra höjdare som fem år senare skulle lärt ett enda ord på "brospråket". Den rätta siffran är förvillande lik ett ägg.

Hur som helst: det var kul, Roland, att Du uppmärksammade min artikel och att Du ville kommentera den! Salutojn plej korajn! Glidis ladlikünol Flen divodikün olik.

**Rune Thorsell**

## FONDUSO MEMORE DE MÄRTHA

Dum la funebra solenaĵo por Märta Andreasson en Göteborg SEF-estrarano Börje Andersson reprezentis SEF kaj estrarano Brita Rehm reprezentis Esperanto-Gården.

Ili parolis por siaj organizoj kaj informis kune ke SEF kaj Esperanto-Gården memore de Märta fondis stipendian fonduson, kaj aliaj organizoj, kluboj kaj personoj povas per donacoj kompletigi la fonduson. La fonduso povas doni stipendiojn al junaj esperantistoj.

Oni povas sendi la kontribuojn al SEF, poŝtĝiro 2012-3 kaj sur la talono skribi: Märta Andreasson-fonduso.

*La Espero* raportos pri donacoj.

# Kursoj en Karlskoga en 2000

Tutsemestra kurso **28/8 – 20/12 2000**

Ekde 1988 nia lernejo havas Esperanto-fakon, kie oni studas Esperanton tutan aŭtunan semestron dum 16 semajnoj en intensa kurso. Ni instruas en la Esperanto-fako proksimume 24 horojn semajne inkl. 4 lecionojn en lingvolaboratorio. Ĉiutagaj hejmtaskoj. Ĉiuj nacianoj estas bonvenaj, ĉar la instruado estas tute en Esperanto.

Vi povas partopreni en la kurso kiel vera komencanto, ĉar ni komencas per bildoj, ĥor-respondoj kaj simplaj frazoj. Se oni relative bone parolas Esperanton, oni tamen povas aliĝi al la kurso. Ĉar la komuna lingvo ĉiam estas Esperanto, oni preskaŭ vivas kiel en Esperantujo kaj tiu fakto logas multe da spertaj esperantistoj al la Esperanto-fako. Ili povas helpi kaj instigi novajn studantojn, havi riĉajn eblecojn paroli Esperante kaj ĝui vere internacian etoson. Studantoj el 38 landoj jam partoprenis en niaj kursoj kaj post 4 monatoj preskaŭ ĉiuj sukcesas en speciala, Lerneja Ekza-meno, propedeŭtika al la Internacia Ekzameno de UEA. Post la kurso multaj jam ekinstruis en propra aŭ fremda landoj.


La studantoj loĝas en modernaj unulitaj ĉambroj kun propraj duŝo kaj necesejo. Troviĝas komunaj kuirejeto kaj TV-ĉambro. Ĉiuj manĝas kune en la lerneja manĝejo. Foje okazas ekskursoj aŭ festenoj. La studantoj rajtas uzi la sporthalon kun saŭno, la foto-, komputilo- kaj biljardoĉambrojn. Oni rajtas kromelekti fakojn kiel ceramikadon, teksadon, komputadon, muzikon, desegnadon, kuiradon k.a.

La lernejo situas bele apud lago en alloga naturo nur du kilometrojn de la urbo Karlskoga.

Karlskoga Folkhögskola
Lars Forsman
S – 691 24 Karlskoga
Svedio
tel. 0586 – 646 00, 646 14
fakso 0586 – 646 22
e-poŝto
lars.forsman@fhsk.karlskoga.se

# Invito al Samarkando

AERO en la koro de la Granda Silka Vojo. Ankaŭ vin atendas la Azia Esperanto – Renkontiĝo AERO – 2000 okazonta subaŭspicie de Universala Esperanto-Asocio en 2750-jara **Samarkando**, dum **15-20 aŭgusto 2000**. Sojle de la nova miljaro AERO celas doni freŝan inspirigan aeron al la azia esperantistaro kaj akceli E-movadon en la regiono. Fakte ni ĝojus bonvenigi gastojn el ĉiuj kontinentoj.



En la programo: seminario pri E-movado en Centra Azio, sinprezento de aziaj E-kluboj, instruista seminario, intensaj E – kursoj por komencantoj kaj progresantoj, internacia arta vespero, 2-hora ekspresa kurso de la uzbeka lingvo, E-loterio, gustumado de famaj uzbekaj vinoj, pikniko en la montaro, vizitado (kun E-ĉiĉerono!) de mondfamaj vidindaĵoj de antikva Samarkando ktp. Laŭdezire aranĝeblos ankaŭ postaj ekskursoj al Buĥarao, Taŝkento, Ŝaĥrisabzo, Penĝikento (Taĝikistano) ktp. Ĉefa organizanto: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Samarkando. Pli detalaj informoj kaj aliĝilo haveblas ĉe:

**Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro**
P.O. Box 76
UZ – 703000 Samarkando
Uzbekio
Rete: *peacetur@samuni.silk.org* (bv. ne sendi longajn retmesaĝojn!)

# Dudek jarojn post Raŭmo

Ĉu ni diras "ion kulture originalan kaj internacie valoran"?

La Manifesto de Raŭmo, verkita kaj publikigita dum la Internacia Junulara Kongreso en Raŭmo, Finnlando (1980), celis siatempe esti radikala kontribuo al la diskuto pri la interrilatoj de la Esperanta movado, Esperanta komunumo, Esperanta kulturo kaj la ekstera mondo.

Kiel parto de la Kultura Esperanto-Festivalo 2000 en **Helsinko**, Finnlando, estos aranĝita duontaga seminario pri ĉi tiuj demandoj. Ĝi okazos sabaton, la **22-an de julio**, ekde la 9-a ĝis la 13-a horo. Prezidos Christer Kiselman, kaj per prelegetoj kontribuos:

- Jouko Lindstedt: "La Manifesto: historia enkonduko – kaj elkonduko"
- Sabira Ståhlberg: "Ĉu internacie inda kaj interesa? Esperanto-kulturo el tutmonda perspektivo"
- Ilja De Coster: "Esperanto-komunumo kaj la civila socio"
- Anna Ritamäki: "La organizita esperantostagnado – elirvojoj 20 jarojn post Raŭmo"

Ankaŭ la publiko havos okazon partopreni en la diskutoj.

La seminarion preparos reta antaŭseminario, malfermita por ĉiuj, dum junio pere de la dissenda listo Bja-listo. La ĉefaj kontribuoj al la antaŭ-seminario kaj seminario estos publikigitaj enrete.

Pli da informoj pri la seminario riceveblas de

**Jouko Lindstedt**
*jouko.lindstedt@helsinki.fi*

# Granda renkontiĝo de gejunuloj en Honkongo

Karaj gejunuloj, la 56a Internacia Junulara Kongreso okazos ĉijare **5an – 12an de aŭgusto en Honkongo** tuj post la UK en Israelo. La orienta perlo estas unika ĉina urbo, kie oni praktikas kapitalismon post la revenigo el Britio dum pli ol 140 jaroj. Do, vidu kaj ĝuu tie kaj travivu la orientan vivmanieron dum 8 tagoj. Ne forgesu viziti *www.esperanto.org/ijk2000* kaj aliĝu jam nun!

# letero de la estraro

## Kontakto kun membroj

La estraro intencas aperigi en ĉi tiu "letero" en *La Espero* la plej gravajn decidojn kaj raporti pri speciale interesaj okazaĵoj. De tempo al tempo aperos ankaŭ petoj kaj admonoj, kiuj direktiĝas al ĉiuj membroj. Tial vi ne forgesu kontroli la lastan paĝon.

## Kontakto kun estraranoj

Preskaŭ ĉiuj estraranoj havas retadreson. Ilin vi trovas sur paĝo 2 de la nuna numero de *La Espero*, kie ankaŭ niaj telefonnumeroj aperas. Ne hezitu skribi aŭ telefoni al ni. Se vi volas direkti retmesaĝon al la tuta estraro, uzu la retadreson *estraro@esperanto.se*.

## Pli juna estraro

En Helsingborg elektiĝis pluraj novaj estraranoj. Al Håkan Lundberg, Saltsjöbaden, kiu jam pli frue estis estrarano, aldoniĝis el la vicoj de SEJU Keiko Snarberg el Jönköping. Junigon signifas ankaŭ la elekto de Kjell Randehed, Helsingborg, pli frue anstataŭanto.

En la unua estrara kunveno la 3-an de junio la taskoj en la estraro estis dividitaj jene:

**Börje Andersson** respondecas pri ekonomio;

**Roland Lindblom** respondecas pri la funkciado de Esperanto-Centro en Stokholmo;

**Franko Luin** respondecas pri organizaj demandoj kaj informado;

**Håkan Lundberg** respondecas pri eksteraj kontaktoj;

**Bengt Nordlöf** respondecas pri eŭropaj kontaktoj;

**Wim Posthuma** estas la kontaktulo kun la kluboj;

**Kjell Randehed** respondecas pri lernejaj demandoj;

**Jan Setréus** estas redaktoro de *La Espero*;

**Keiko Snarberg** respondecas pri junulara agado.

## La Espero ĝisdata

Ĉi tiu numero aperas tute laŭplane en junio. Per tio *La Espero* plene rekaptis la deziratan aperritmon kaj ni esperas, ke ĝi retenos ĝin. Aperos post la somero numero 4 fine de septembro kaj la kutima duobla numero 5-6, ĉi-jare fine de novembro.

## Somera paŭzo

En sia estrarkunsido la estraro jam pridiskutis la diversajn decidojn de la jarkunveno. Ĉar multaj estraranoj kaj membroj ne estos facile atingeblaj dum la somero pro vojaĝoj kaj libertempado, la pluaj diskutoj kaj realigo estas ŝovitaj ĝis la aŭtuno.

***Agrablan someron al vi ĉiuj!***

# Sök stipendier till sommarkurs i Lesjöfors

*"För att hedra Märtha Andréassons minns ställer Esperanto-Gården två friplatser vid en sommarkurs till förfogande för SEJU att användas för esperantoungdom."*

Platserna är alltså inklusive både kost och logi. Givetvis vill vi att detta skall gå till våra medlemmar! Om ni är intresserade av att gå på sommarkurs i Lesjöfors i år, skicka en ansökan till Janko (janko@esperanto.se) eller Lovisa (miaujo@hotmail.com). Det går också bra att skicka per vanlig post till

**Lovisa Gustafsson**
Slättevalla
Nolgården 1
540 66 Sjötorp

Ansökan ska innehålla ditt namn, adress, telefon, mejladress, ålder, tidigare Esperanto-erfarenheter (kortfattat), kortfattad motivering till varför du vill gå kursen, något förslag på vad du skulle vilja att SEJU gjorde för sina medlemmar (frivilligt). vilken av veckorna du vill delta, och om du kan även den andra veckan eller inte.

Under vecka 25 (19-25/6) kommer vi att meddela alla sökande om de fått stipendiet eller inte. Ansökan måste därför vara oss tillhanda senast den 19/6. Har du frågor så kontakta Janko (janko@esperanto.se) eller Lovisa, som har gått nybörjarkursen (miaujo@hotmail.com) eller på telefon 0501-506 95

I år går det två sommarkurser i Lesjöfors, med start 16/7 och 23/7. Mer information om kurstiderna: http://www.esperanto.se/enytt/ (klicka på kurser).

Mer information om kurserna fås från Lars Forsman: *lars.forsman@fhsk.karlskoga.se* (eller telefon, 0586-548 11).

**SEJU**

# Tusen kronor på nio dagar

Som två vita kylskåp, men utan öppningsbar dörr. Så ser de ut, den nya värmepumpen och varmvattenberedaren vid Esperanto-Gården. Åtminstone för det ovana ögat.

Bergvärmeanläggningen blev installerad i början av april och fungerar som förväntat. Men det är kallt i källarvåningen, den gamla oljepannan står inte längre och strålar ut mängder av spillvärme.

Kalle Elofsson, vår ständigt närvarande hantverkare och fastighetschef, går ofta med papper och penna i fickan och gör sina anteckningar. På frågan "hur går det nu då" kikar han på lappen och kommenterar.

—Vi har sparat ungefär tusen kronor de första nio dagarna. Men naturligtvis måste värmepumpen gå en längre tid för att vi ska få mer exakta siffror.

Priset för installationen blev 390 000 kronor inklusive moms, men om ett år kommer 78 000 kronor (momsen) tillbaka från skattemyndigheten.

För det särskilda energisparlånet från medlemmarna har hittills omkring 120 000 kronor tecknats.

**Bengt Nordlöf**

